


LA VERDA LUPEO



2 (81) **INFORMILO DE ELF-AREK** 22a jaro * 1990 *

FELADO
FEKETE ISTVAN
H–1137 BUDAPEST
Ditrói Mór 3. II. 6/a

LEVELEZŐLAP

ESZPERANTÓ KONGRESSZUS
MAGYAR POSTA 5 Ft

29a HUNGARLANDA ESPERANTO KONGRESO
BUDAPEST 4, 1990. MÁJUS 17.

XXIX. ORSZÁGOS ESZPERANTÓ KONGRESSZUS

29a HUNGARLANDA ESPERANTO KONGRESO
BUDAPEST 1990. MÁJUS 19.

ÁRA: 6,– Ft
ÁLLAMI NYOMDA

Novaj tutaĵoj el Hungario kaj Bulgario.
(Detaloj interne)

БЪЛГАРИЯ BULGARIA
ПОЩА 10 ст
100 ГОДИНИ ЕСПЕРАНТСКО ДВИЖЕНИЕ В БЪЛГАРИЯ
100 JAROJN ESPERANTO-MOVADO EN BULGARIO

100 JAROJ ESPERANTO-MOVADO EN BULGARIO • 1889 1989 •
1000 SOFIA 23.2.1990

СОФИЯ • SOFIJA 23 II 90 1000

100 ГОДИНИ
ЕСПЕРАНТСКО
ДВИЖЕНИЕ
В БЪЛГАРИЯ

100 JAROJN
ESPERANTO-MOVADO
EN BULGARIO

ПОЛУЧАТЕЛ:
УЛ №
БЛОК ВХ АП №
Al RUDOLF BURMEISTER,
D.D.R - 9047 Karl-Marx-Stadt,
W. - FIRL - Str. 30
ГДР

NIA ADRESARO - NIA ADRESARO

Nova adreso de via redaktoro: (Vd. lastan paĝon).

Pardonu la tajperaron en la LVL 1(80). La korekta nomo estas: Cornelius J. Mc.Kown

MORTIS - MORTIS

Nia kluba amikaro adiaŭis nian Kurt Lindström

Grandan florkronon kun adiaŭaj vortoj sur la rubando je la nomo de nia amikaro en ELF/AREK metis nia Ivar Paulsson sur la tombon dum la entombiga ceremonio. Nia kluba amikino Terttu Östermann donacis je la memoro de nia Kurt al nia kluba kaso 500,-- SEK. Dankon al ŝi.

NI PRI NI - NI PRI NI

Nia nova vesto

Ricevitaj nur estas laŭdoj pro la nova aspekto de nia LVL. Kvankam nia kluba amiko Richard Hirsch estas sufiĉe okupita pro administraj laboroj kiel ĝenerala sekretario de Germana Esperanto-Asocio, li kun granda entuziasmo transprenis la taskon, "presigi" nian informilon. Ja ne nur temas pri retajpado de miaj manuskriptoj, sed ankaŭ pri kopiaj laboroj. Jam antaŭ monatoj li pretigis ankaŭ la novan "kapon" de nia LVL, kaj utiligis por ĝi nian kluban glumarkon, faritan de nia Hermann Menges. Kun ĝojo mi konstatis, post ricevo de nia LVL 80, ke Hirsch pretigis ĝin kun amo kaj intereso. Surprizis eĉ la novstila bindado. Nelaste ĝojigis la plasta ekspeda sako kun la E-a afrankstampo de GEA. Mi ĝojas ankaŭ, ke unu el inter ni, el inter niaj spertaj klubanoj, nun kompostas (kompilas) kaj multobligas nian LVL. Nome de nia kluba amikaro mi esprimas kontenton kaj sinceran dankon al nia Richard Hirsch. -Rudolf Burmeister-

EKSPOZICOJ KAJ NI

Mia Maatman ekspoziciis

Hazarde en miajn manojn falis la nederlanda E-gazeto "Fenomeno 1/1988. En ĝi mi trovis la artikolon "Filatelo kaj Esperanto". Tiu raportis pri filatela ekspozicio en novembro 1988 en Amsterdam (NL). Kun surprizo mi eksciis, ke partoprenis tiun ekspozicion nia kluba amikino Mia Matman per eksponaĵo pri Esperanto. Ŝi akiris eĉ arĝentumitan bronzan medalon. Koran gratulon. Eble vi jam denove ie ekspozici(os)is.

Richard Hirsch ekpoziciis

Meze de junio 1990 Hirsch ekpoziciis en Linz (A) okaze de la 500-jara urba jubileo de Linz sian eksponaĵon "Esperanto en la Filatelo". Temis pri ekspozicio en la "Rango I". Li akiris tie arĝentan medalon. Gratulon!

KLUBANOJ SURVOJE

Prelegoj en Nederlando

En aprilo 1990 mi en nederlanda provinco Holando parolis en la E-kluboj de Schoorl kaj Alkmaar en la kadro de grupvesperoj kaj de studotagoj pri E-filatelo kaj montris lumbildojn. Koran dankon al Oene Hoekstra, kiu organizis la prelegojn kaj kiu gastigis nin. Kun ĝojo mi ankaŭ povis revidi Annie Wester. Kun plezuro mi rigardis ŝian valoran kolekton. Dankon pro la festa vespermanĝo, pro la bonega kafo kaj pro la prezentado de la Zaandam-a vilaĝa muzeo.

Esperanto en mondfama flor-ekspozicio

Centmiloj da vizitantoj ĉiujare nombras nepriskribeble belega florekspozicio en KEUKENHOF en norda Nederlando. S-ro Oene Hoekstra min tien venigis. En tiu pompa maro de belegaj floroj trovis lokon ankaŭ tulipo kun la nomo "ESPERANTO". Temas pri natura varianto de la tulipo "HOLLYWOOD", kiun trovis en la jaro 1977 samideano Pranger. Li ĝin kultivis kaj nun povas vendi ĝin.

FAMAJ ESPERANTISTOJ

Hasegawa Teru - verkistino

Fama japana Esperantistino. En Esperantujo ni konas ŝin sub la nomo "Verda Majo". Ŝi naskiĝis la 7an de majo 1912 en Japanujo kaj mortis la 10an de januaro 1947 en la ĉina urbo Jiamusi. En la tiea "Tombejo de la Martiroj" ŝi ripozas apud sia edzo Liu Ren. Esperanton ŝi komencis lerni en junio 1932 en Tokio. Tie ŝi membris en la "Japana Proleta Esperantista Unio" kaj aktivis en la E-rondo "Klara Zetkin". 25-jara, ŝi konatiĝis kun ŝia edzo kaj sekvis lin al Ĉinio. 19 04 1937 Verda Majo ŝipe atingis la ĉinan teron en Ŝanhajo. Tie ŝi aliĝis al la Ĉina Proleta Esperantista Unio kaj aktivis en la Ŝanhaja Esperantista Ligo. La 15 07 1937 ŝi partoprenis la E-Kongreson de la Ŝanhaja E-Ligo, organizita okaze de la ora jubileo de Esperanto. Verda Majo partoprenis en la rezistmilito kontraŭ la japanaj invadintoj.
El ŝia plumo fontas pluraj E-libroj. i.a. "En Ĉinio batalanta" kaj "Flustr'el uragano". En la jaro 1982 Ĉina E-Eldonejo aperigis la libron "Verkoj de Verda Majo". Nia kluba amiko

Ĉin Kajĝi estis proksima amiko de Verda Majo dum ŝia restado en Ŝanhajo kaj zorge konservas karajn memoraĵojn pri ŝi.

Fontoj: "Verkoj de Verda Majo", eld. 1982 en Pekino
Memora poŝtkarto, eld. 1990 en Jiangmen
Leteraj informoj de Ĉin Kajĝi al mi en 1989

POŜT-KAJ MAKSIMUMKARTOJ

Sennominala pk "Verda Majo"

PTO Jiangmen eldonis la 7an de marto 1990 memoran poŝtan karton sen nominalo honore al la 78a naskiĝtago de Verda Majo. Dorsflanke portreto pri ŝi farita de Tenf, laŭ foto farita en la jaro 1944. Krome biografiaj tekstoj en la ĉina kaj en Esperanto. Adresflanke troviĝas la notoj: Poŝtkarto de Ĉina Popola Respubliko, adresato, adresanto. La tekston verkis Ĉin Kajĝi.

Maksimumkarto de Pollando

Nia Stefan Bielak informis pri ĝi. PAF (Pola Asocio Filatelista) okazigis "maksimofilan ekpozicion ´89" en Bialistoko. "Oni" eldonis maksimumkarton kun portreto de Zamenhof. Projektis ĝin A. Trzcinski. Eldonkvanto: 3000 ekzempleroj. Dankon al Stefan!

TUTAĴOJ - TUTAĴOJ

Nova tutaĵkoverto el BG

"100 JAROJN ESPERANTO MOVADO EN BULGARIO", verda stelo kaj verda flago en rektangulo estas surpresitaj sur 5-stotinka koverto el la jaro 1989. Eldoninto kaj eldonkvanto ne konata. Dankon al nia Hlebarov, kiu sendis la tutaĵon al mi. Plej verŝajne ĝi aperis en februaro 1990, lige kun la samtema stampo, kvankam la jubileo okazis jam en 1989. (bildon vd. sur la titolpaĝo).


Tutaĵ-poŝtkarto el Hungario

La 17an de majo 1990 aperis kun eldonkvanto de 20 000 ekzempleroj tutaĵo kun surpresita E-pm (!) de 5 forintoj okaze de la "29a HUNGARLANDA ESPERANTO KONGRESO". Tiu okazis 19an de majo en Budapest. Iniciatis ĝin nia aktiva kluba amiko Johano Szilayi. La grafikisto estis L. Kekesi. La poŝtmarko montras sur bruna fono radiantan verdan E-stelon. La poŝtejo BUDAPEST 4 uzis trilingvan unutagan stampon kaj specialan stampon dum la 17a de majo. (vd. titolpaĝon). Ni dankas al niaj amikoj Fekete kaj Radnai pro la senditaj informoj!

E-poŝtkartoj de GDR (Daŭrigo el LVL 66)


	43-1	85 09	5a IMEK	10		500
	43-2	85 09	5a IMEK	25		100
	44-1	85 09	Javal	10		500
	44-2	85 09	Javal	25		100
	45-1	85 12	Tago de E-Libro	10		3000
	45-2	85 12	Tago de E-Libro	25		250
	46-1	86 02	100 jaroj E.(jub.emblemo)	10	(verda pm)	1000
	46-2	86 02	100 jaroj E.(jub.emblemo)	10	(oranĝa pm)	1000
	47	86 02	100 jaroj E.die intern..	10	(verda pm)	1000
	48-1	86 03	IFER 86	10		3000
	48-2	86 03	IFER 86	25		250
	49-1	86 04	GLEA	10		3000
	49-2	86 04	GLEA	25		250
	50-1	86 12	Tago de E-Libro	10		3000
	50-2	86 12	Tago de E-Libro	25		250
	51	87 02	100 jaroj E.(Halle)	10		5000
	52-1	87 03	100 jaroj E. (IFER 87)	10		3000
	52-2	87 03	100 jaroj E. (IFER 87)	25		250
	53	87 10	100 jaroj E. (oranĝkolora)	10		200
	54	87 10	100 ajroj E.(Harca E-Ren.)	10		200
	55-1	88 01	Tago de E-Libro	10		3000
	55-2	88 01	Tago de E-Libro	25		250
	56-1	88 03	IFER 88	10		3000
	56-2	88 03	IFER 88	25		500
	57	88 04	Arta Semajno Halle	10		5000
	58-1	88 11	Tago de E-Libro	10		3000
	58-1	88 11	Tago de E-Libro	25		500
	59	89 05	Ludwig Renn (verda sp.)	10		250
	60-1	89 05	Jarmeza E-Semajnfino	10		3000
	60-2	89 05	Jarmeza E-Semajnfino	25		300
	61-1	89 12	Renn-Saluto (nigra sp.)	10		3000
	61-2	89 12	Renn-Saluto (nigra sp.)	25		300
	62-1	90 04	Mitteilungsblatt-E.	10	(oranĝa pm)	3000
	62-2	90 04	Mitteilungsblatt-E.	10	(nova ve pm)	rara
	62-3	90 04	Mitteilungsblatt-E.	25		300
	63-1	90 05	5a E-renkontiĝo	10	(oranĝa pm)	3500
?	63-2	90 05	5a E-renkontiĝo	10	(nova ve pm)	50 ?
	63-3	90 05	5a E-renkontiĝo	25		250
	64	90 05	5a Centra Renkonto	10	(nova ve pm)	?





La tutaĵoj de Vasil Eroŝenko kaj Ŝamil Uzmanov . Priskriboj vd. en LVL 1(80).

Lastminute:



Ankoraŭ dum la kompilado de LVL atingis min ĝis nun nekonataj stampo (BG 25) kaj tutaĵo. Detalojn ni ĝis nun ne ricevis. Eble ni povas publikigi ilin en la venonta LVL.

E-POŜTMARKOJ

Nova el Bulgario

Nia Kiril Hlebarov surprizis nin per alsendo de nova bulgara bulgara E-pm. Temas pri pm kun la nominalo de 10 stotinkoj. La pm montras E-flagon, E-stelon, tekston: "100 JAROJ ESPERANTO MOVADO EN BULGARIO 1889 - 1989", sube en la marko la nomo de la grafikisto: Petr Petrunov kaj la eldonjaro 1989. La pm tamen iom malfruiĝis kaj verŝajne aperis nur la 23an de februaro 1990. Tion eldiras la datstampo. Dankon al vi, Kiril Hlebarov. Certe vi postliveros, se vi ilin akiros pliajn detalojn.
(bildo vd. sur la titolpaĝo)

STAMPOJ - STAMPOJ

RA 10 - 49a Nacia Kongreso



Nia Alessandro Belucci, Italujo, en filatela merkato trovis tiun al ni nekonatan argentinan poŝtan stampon kun la teksto: "COMTE LOCAL PARA LA ORGANIZACION DEL 49° CONGRESSO ARG DE ESPERANTO". Nomo de la urbo: 3700 R. Saenz Pena. La dato: 20/23 julio 1989. Apud en la nigra ĝi ankaŭ ekzistas en klare blua koloro. Ekzistas ornama (memora) karto kun la kongresa emblemo. Dankon al li!

BG 25 - 100 jaroj Esperanto en Bulgario

Vd. "Lastminute" sub tutaĵoj.

BG 26 - Bulgara Jubileo

Lige kun la surpriza nova bulgara E-pm aperis en Sofio tiu ornama ronda stampo kun granda E-stelo kaj teksto: "100 jarojn Esperanto-Movado en Bulgario 1889-1989". En la stampo estas la dato: 23 02 1990. Nia kluba amiko Hlebarov sendis ĝin. Dankon al li. Cetere ankaŭ li havis viziton de nia korea amiko so gilsu. Kvankam Hlebarov loĝas en ne libere alirebla teritorio, so gilsu sukcesis veturi al li. (bildon de la sta. vd. sur la titolpaĝo).

Enkonduko pri ĉinaj sta

Niaj pasiaj stampo-kolektantoj ĝemas pro problemoj kun la ĉinaj sta. Nur malmultaj kapablas klasifiki ilin laŭ lokoj. Ni estas feliĉaj pro nia LVL. Tiu ĉi klopodas kopie montri ilin. Kaj, denove direndas, tio eblas nure pro helpo de Ĉin Kajĝi.

La bildoj de la ĉinaj stampoj 90 01-10 (128-137)



90-01 (128)
Changde



90-02 (129)
Changshu



90-03 (130)
Jiangmen



90-04 (131)
Lhasa



90-05 (132)
Ma´anshan



90-06 (133)
Nanchang



90-07 (134)
Ninghai



90-08 (135)
Jiangmen



90-09 (136)
Jiangmen



90-10 (137)
Xinhui

| TJ 138 Filantropia Tago (90-11) |



Aú mi ne ricevis, aú perdiĝis klarigoj pri tiu ĉi kaj la sekva stampoj. Okaze de la "FILANTROPIA TAGO DE ZHONGSHAN" aperis 1990.2.2. du samtempaj, sed divers-aspektaj stampoj kun la supra teksto en E. 90-11 montras en emblemo saltantan ĉevalon. Tial mi ĝin lokigis tuj post la ĉevaljaraj.

| TJ 139 - Filantropia Tago (90-12) |



La dua stampo ankaú de Zhongshan. Tiu posedas tripintan emblemon en la stampo sen ĉevalo. Sed vi ja helpe de la kopioj bone konatiĝos kun ĝia aspekto. Bedaúrinde mi ne disponas pri aliaj detalaj informoj.

(Klarigo: Filantropio estas (laú E. Wüster): (filantropo=homamulo) bonfarado, bonfaremo.)

| TJ 140 Norman Bethune (90-13) |



MPT de Ĉinio kaj Kanado aliance emisiis pm memore al la 100-a naskiĝtago de Norman Bethune. Li estis en Ĉinio fama Kanada kuracisto kaj granda amiko de la ĉina popolo. Li aktivis en la ĉina kontraú-japana rezistmilito. La stampo montras portreton, ĉinan kaj la E-tekston: "LA 100 JAROJ DE NORMAN BETHUNE". Uzis ĝin la PTO de Changshu en la 3a de marto 1990. Desegnis ĝin Zhang Linrui.

TJ 141 - Norman Bethune (90-14)



Tiu ĉi venas el la PTO de Jiangmen kaj posedas alian portreton kaj la tekston: "100-a NASKIĜTAGO DE NORMAN BETHUNE" en E., en la ĉina kaj angla. Desegnis ĝin "Tenf".

TJ 142 - "Verda Majo" (90-15)



Jen vere valora movada stampo kun portreto pri samideanino Verda Majo el la PTO Jiangmen. La portreto en la stampo estas farita laŭ foto el la jaro 1937. La teksto: LA 78 JAROJ DE LA NASKIĜO DE VERDA MAJO". La stampon desegnis nia talentoplena kluba amiko Zhang Linrui. Gratulon!

TJ 143- Verda Majo (90-16)

Jiangmen-a PTO kaj Jiangmen-a E-Ligo aperigis 1990-03-07 ankaŭ poŝtan stampon pri Verda Majo. Desegnis ĝin Tenf laŭ foto, farita ĉirkaŭ la jaro 1944. Tiam ŝi loĝis apud la urbo Chongqing kaj laboris en kulturlabora komitato sub la gvido de fama verkisto Guo Mojo. La stampo posedas la tekston: 78-A DATREVENO DE LA NASKIĜO DE VERDA MAJO kaj sube videblas koro kun E-stelo.



TJ 144 - Internacia Virina Tago (90-17)

Nia kluba amiko Zhang Linrui, elstara grafikisto el Ĉinio, estas la aŭtoro de tiu ĉi poŝta memoriga stampo pri la "LA 80 JAROJ DE LA INTERNACIA VIRINA TAGO". Tiel Esperante kaj ĉine tiu stampo tekstas. En ĝia mezo tri virinaj kapoj. Lige kun tiu ĉi evento aperis samtema pm en Ĉinio (J. 167) kun nominalo de 20 fenoj. La stampo aperas kun la dato: 1990.3.8. (8an de marto). Uzata ĝi estis en la urbo Changshu. Dankon kaj saluton al nia kluba amiko Ĉanŝio!



TJ 145 - Samtema el Jiangmen (90-18)



Tri virinoj kaj ok kolomboj montras tiu ĉi stampo kun la teksto: "80 JAROJ DE LA INTERNACIA VIRINA TAGO", ankaŭ en la ĉina. Dankon al la alsendinto, kies adreson mi bedaŭrinde ne kapablas elĉinigi.

TJ 146 - Arboplanta Tago (90-19)



1990.3.12. en Jiangmen aperis stampo kun kvin arboj kaj la teksto: "LA 12-A ĈINA ARBOPLANTA TAGO .....LA PATRIA VERDIGO".

TJ 147 - El Popola Ĉinio (90-20)




Kiu ne konas ĝin, nian "EL POPOLA ĈINIO"... En la unua de majo 1950 ĝi naskiĝis kaj nun ĝi fariĝis jam 40-jara. Ne ĉiam por ĉiu estis facile akiri ĝin. Jen la plej aktuala ekzemplo: Al la unuaj agoj de la nova demokratie elektita registaro de GDR apartenis, ke oni altigis la abontarifon de 40,-- gmk al 240,-- gmk.
Laŭdire la malnova (ankaŭ 40-jaraĝa) registaro donis ĉiujare 200,-- gmk da subvencio . Kompreneble la rezulto estis katastrofa, ĉar ĉiuj 350 abonantoj de EPĈ en GDR malabonis ĝin. Nu bone, tio baldaŭ estos riparita, post la mon-unuiĝo de ambaŭ Germanioj.
Sed revene al la naskiĝtagulo: Aperis bela filatelaĵo okaze de tiu evento: poŝta stampo kaj poŝta memorkoverto. La stampon desegnis nia Zhang Linrui, la koverton, eldonita de la Pekina Xiqu-a Poŝtmarka Kompanio, Wang Yulei. Mi esperas povi prezenti al vi kopie ĝin. Dankon pro la alsendo al nia Ĉin Kajĝi.
Bedaŭrinde ĝis nun ne atingis min via letero, anoncita per la dato: 1990.05.12. Certe en ĝi estas pli bonaj klarigoj pri la novaj ĉinaj stampoj, ol miaj elpensitaj klarigoj.

F 56 - E-semajno en Nico

Jam priskribita kun bildo en la LVL 80. La desegnaĵo en la tekstoparto de la ms ni trovas ankaŭ sur glumarkoj. Koran dankon al niaj klubaj amikoj: Legris, Amouroux kaj al la klubo en Nico pro la senditaj informoj.

F 57 - SAT-Amikara Kongreso



Nia Andre Sadier informis, ke la ms funkciis en la tempo de 19a de marto ĝis la 18a de junio 1990 okaze de supre nomita evento en Bondy (apud Parizo). Tiu kongreso okazis de la 14 - 17a de aprilo. Dankon al li pro la senditaj informoj.

GDR 41 - Va E-Renkontiĝo de GDREA en Brandenburg



Por tiu renkontiĝo uzis la poŝtoficejo de DDR-1800 Brandenburg de 25 05 - 08 06 1990 la apudan stampon.

GDR 40 - 25 jaroj E en Kulturligo



Nia kluba amiko Beau, Leipzig, iniciatis tiun ĉi jubilean stampon okaze de 25 jaroj Esperanto en la Kulturligo de GDR. En Kulturligo de GDR komune membras plej diversaj hobio-grupoj, kiel filatelistoj, foto-amatoroj, numismatikistoj, akvarianoj, flaŭristoj kaj faŭnistoj, ktp., ktp.. Sed momente la Kulturligo estas en granda danĝero, kaj kun ĝi ankaŭ nia GDREA pro ebla nuliqo de ŝtata subvencio flanke de la nova demokratia kaj libereca registaro de GDR. La stampo funkciis de 31 03 - 29 04 1990 en la poŝtejo Leipzig 1.

E 30 - 49a Nacia Kongreso

Neniu ĝis nun protestis, ke ne aperis informo pri ĝi. Fakte jam ekde januaro mi sciis pri ĝi, sed la materialo dronis ien kaj nur hodiaŭ mi ĝin retrovis. Tamen en la kataloga suplemento 90 jam ĝi trovis lokon, bilde kaj tekste. Fakte mi ricevis la informon nur en formo de memorkover-toj, kaj vidu mem: la sta kun la dato 19 - 21 07 1989 posedas la tekston: "49a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EXP FCA (??)" kaj montras monumenton pri D. Diego Lopez de Hara. Ekzistas memorkoverto kun samaspekta surpreso de la sta. Dua memorkoverto posedas alibildan surpreson kun la kongresaj datoj: 19 - 23 julio 1989. Kaj tria memor-koverto de ALFIL diras: 9-12 JULIO 1989. Dankon al nia kluba amiko Emilio Lopez, kiu jarfine sendis la kovertojn al mi.

E 31 Kongreso de la Valencia E-Federacio kaj Filatela Ekspo.



Al tiu aranĝo, kiu okazis la 28 04 1990 estis stampo. La jubilea emblemo estas ĉirkaŭita de enskribo. En la mezo konturoj de kvinpinta stelo kun regiona landkarto kun dato. La aranĝo okazis en Benicasim. Detaloj el Hispanujo ne estas konataj. Ili sekvos sekvontnumere.

H 111 - IJS en Szolnok



INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO IJS SZOLNOK tekstas tiu stampo uzita dum la 9a de julio 1989. Pri ĝi ankoraŭ mi ne informis, kvankam jam dufoje devis aperi tiu informo. IJS okazos ankaŭ ĉi-jare . Mi tre esperas, ke ĉi-foje ĝia bildo aperos en nia LVL, kune kun aliaj novaj stampoj de Hungario. Informojn pri ĝi siatempe sendis niaj Fekete kaj Radnai. Dankon al ili.

H 112 130a naskiĝtago de Zamenhof

H 113 19a VEF



Teksto de H 112 kaj H 113 vd. en LVL 80.



H 114 - Hungarlanda E-Kongreso



La novan E-tutajon akompanis en la 17a de majo 1990, uzita de poŝtejo Budapest 4, memoriga poŝta stampo. En pentagono radianta E-stelo. "29a HUNGARLANDA ESPERANTO KONGRESO -BUDAPEST 4 - 1990. MAJUS 17." tekstas tiu stampo, pri kiu informis nia Istvan Fekete.

H 115 - Hungarlanda E-Kongreso



18 - 20. 5. 1990 okazis en Budapeŝo la 29a Hungarlanda E-Kongreso. 1990.05.19 estas la dato de la kvadratforma E-stampo. Tiu montras radiantan E-stelon en kvarangulo. Inter la alsenditaj materialoj mi trovis du kartojn (ne poŝtkartojn) kun memorigaj surpresaĵoj pri tiu ĉi kongreso. Koran dankon pro la senditaĵoj al niaj Radnai kaj Fekete.

YU 43 - Koko el Jugoslavio



De nia W. Heimlich min atingis la sciigo pri tiu - ĉi en nia stampobanko havebla nova jugoslava stampo. Temas pri ronda presita stampo kun la teksto: "10 GODINA ESPERANTO KLUBO KOKO" DURDEVAC 30 03 1990. Desegnis la stampon prof. Ivan Senjan, prezidanto de la loka filatelista klubo en Virje. Lige kun la sta aperis memora karto pri la jubilea klubo. Faris ĝin la filatelista klubo en Virje.

YU 44 - Duobla Jubileo de JAFE



Jugoslaviaj E-Fervojistoj antaŭ nelonge festis duoblan jubileon: 65 jaroj de organizita E-movado inter jugoslaviaj fervojistoj kaj 35 jaroj de JAFE. Unuope traktitaj la jubileoj ne estas "rondaj", sed ilia sumo estas tamen estiminda: entute 100 jaroj. La jubilea manifestacio okazis


en Vranje (Suda Serbio) sabaton, la 21an de aprilo 1990 en ĉeesto de pli ol 200 membroj el 14 fervojistaj E-societoj kaj aliaj gastoj el la tuta lando.
(Informoj el la "Internacia Fervojisto 3/1990)

C 6 - Nekonata kuba sta el 1988

Mia amiko Oene Hoekstra min i.a. gvidis al UEA en Rotterdam. Tie mi rigardis la E-filatelan trezorejon. Mi trovis nekonatan kuban stampon el la jaro 1988 en pli granda kvanto. Ŝajne temas pri ms(?)en verda koloro. En cirklo estas verda stelo kun la landkarto de sudameriko. La sama emblemo estas sur la dekorkoverto. La sta. estas eldonita la 30 11 1988 okaze de la "Internacia Konferenco por la evoluo de Esperanto en Iberio-Ameriko", kiu okazis de la 30 11 ĝis la 02 12 1988 en Havano (Kubo).




PL 135 - Zamenhofa sta



25 11 1989 okazis en Bialistoko "Kartmaksimuma Filatela Landa Ekspo".Organizis ĝin Pola Asocio Filatelista" (PAF). En la ekspo-poŝtejo estis havebla stampo en la pola lingvo kun Zamenhof-a portreto kaj kun la emblemo el nia sta PL 133. Trovis ĝin nia Bielak en fila-gazeto kaj akiris ĝin originale meze de marto. Dankon al li pro la sendita kopio kaj informo.

AP 8 (GB) AMIKARO



Nia Amouroux sukcesis trovi kompetentan personon por respondi nian demandon pri ĝi. Niaj supozoj montriĝis ĝustaj! S-ano David H. Withey skribis, ke temas pri E-vorto. AMIKARO estas nomo de serio da skoltaj tendaroj en la graflando WARWICKSHIRE (Britujo). Partoprenis ĉ. 500 skoltoj, inter ili nur 4 E-

istaj skoltoj. Tamen! En 1990 denove funkcios skolta tendaro sub la nomo AMIKARO en WARWICK. Pri la pošteco de tiu ĉi stampo ni tamen havas dubojn.

Lastminute:

N 5 - 42a IFEF-Kongreso en Hamar



Nur post la kompilado de la stampoj atingis min tiu stampo el Norvegujo. Detaloj ne estas konataj. Ni publikigos ilin en la venonta LVL.





Karikatura poštkarto, eldonita okaze de la 3a Universala Kongreso en Cambridge (Kembriĝo) (GB) en la jaro 1907



Alia poštkarto de la 3a UK en Cambridge 1907. Ĝi montras la E-instruadon al policistoj.

Ĉinaj nepoŝtaj stampoj

Fine ni montras sube kelkajn de la nepoŝtaj ĉinaj stampoj, kiuj aspektas poŝtaj. Pluraj el nia klubaj amikoj petis montri ilin.















Gratuloj

4 5 0 0 0 3

《中国报道》创刊四十周年纪念封

Memorkoverto por la 40-jariĝo de "El Popola Ĉinio"









郑州
纬八路三号院五楼三号
卢成之同志
北京中国报道社

BXJF. 8

1 0 0 0 3 7

Ankaŭ nia ELF-AREK gratulas al nia gazeto EPĈ pro ĝia 40-jariĝo.



Nakiĝtagon havis nia. redaktor',
ni gratulas el plena kor'.
Rondcifere sesdek li nun estas,
esperante, ke li ankoraŭ multajn jarojn restas
ĉi-tie sur la ter
pro longtempa labor' por nia afer'.
Li ne nur la filatelon ŝatas,
sed li ankaŭ fiŝkaptadas.
Festu en gaja rondo familia
kaj restu ankoraŭ multajn jarojn redaktoro nia!!

GLUMARKOJ - GLUMARKOJ

ATENTIGO!!


Dum la lastaj jaroj la neporokazaj glumarkoj inundas nian merkaton. Inter tiuj glumarkoj ankaû estas multaj fantaziaĵoj. El tiuj kaûzoj mi decidis, ne plu aperigi tiajspecajn glumarkojn. En la venontaj numeroj de LVL vi nur trovos porokazajn glumarkojn. Tial ĉi-tie la peton al E-organizaĵoj kaj Individuaj Esperantistoj: Bv. estonte sendu de la de vi eldonitaj porokazaj glumarkojn specimenon aû al mi aû al la redaktoro. Ne forgesu indiki detalojn! Dankon.

R.Hirsch











Kalendareto, eldonita de la leipcigaj ge-Esperantistoj. Dorsflanke germanlingva Kalendaro.

Informilo de ELF-AREK
Esperanto Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcio ĉe: Rudolf Burmeister, W.-Firl-Str. 30, Chemnitz, DDR-9047
Prezidanto-Kasisto: Ivar Paulsson, Skytteholmsvägen 29, S-171 44 Solna
Poŝtĝiro-Konto: 51 57 85-4, I. Paulsson, Solna (S)
Kotizoj por 1990: 60 SEK (10 US$ aû 20 IRK)
Stampobanko: Werner Heimlich, Fröbelstr. 4, D-3040 Soltau
Kompostis + Ekspedis: Richard Hirsch, Lambertstr. 12, D-6430 Bad Hersfeld



LVL estas pli alloga!!!